

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (917) • 2016 •

Bibliaj tagoj 2016

Ĉijare, en aprilo, la Bibliaj tagoj okazis en Baia Mare, Rumanio.

La partoprenantoj



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Johano – la Evangelio de kredo	27
La Esperanto-Biblio 40-jara	30
La graveco de la Sankta Biblio	33
Sidi sur pingloj ĉe Walter Kampfrad	34
Reagoj	36
Dukapa monstro naskiĝis en Hindujo	37
La akvotunelo de Ŝiloaĥ	38
Ne forgesu ĝoji!	40
Bibliaj tagoj en Baia Mare	41
Lignopreĝejoj en Maramureŝo	44
Informetoj	46
Sur azenid' al Jerusalema	48

Redaktoraj vortoj

Antaŭ kelkaj tagoj mi rememoris, kaj fakte iom surpriziĝis, ke antaŭ 10 jaroj mi fariĝis redaktoro de Dia Regno. La jaroj vere rapide pasis.

Dum tiuj jaroj multaj kaj diversaj artikoloj estis publikigitaj. Dumtempe ankaŭ la verkantaro ŝanĝiĝis, unuj verkis multajn artikolojn, aliaj ne same multajn. Bedaŭrinde kelkaj kontribuantoj forpasis dum la jaroj, sed gajige aliaj ekverkis pli aktive.

Alia trafluganta penso pro la 10-jara redaktado temis pri ebla posteulo. SE hazarde mi ŝatus transdoni la redaktadon al iu alia funkciulo – al kiu? Ne timiĝu, ne estas mia plano – sed ne troviĝas multaj gejunuloj inter ni kaj tio malfaciligas trovi novajn funkciulojn, se necese. Ankaŭ en aliaj organizoj tio estas ofta situacio. Ni devas forte pripensi kiel ni fortigu nian KELI, i.a. trovi novajn membrojn. En tiu laboro ni ĉiuj devas agi.

Krome - bonan legadon!

Johano — la Evangelio de kredo

Tradukis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Antaŭ nelonge mi trovis studlibron pri la Evangelio de Johano de M. C. Tenney, usona profesoro pri Novtestamentaj studoj. La libro kaptis min kaj instigis min partigi iom de ĝia enhavo, tradukante pli malpli la duan ĉapitron.

La Evangelio de Johano havas klaran kaj specifan strukturon. La klarigo de la celo, ago, tempo kaj la kronologia kaj geografia sekcioj klare indikas ke la aŭtoro Johano havis vastan scion pri la vivo de Jesuo, kaj lia maniero kompili la historion estas kaj inteligenta kaj celkonscia. Estas ankaŭ klare, ke lia rakonto ne estis priskribo biografia, ĉar ekzistas mankoj en ĝi, kiujn li ne ŝajnis plenumi. Ĝi ankaŭ ne estas unuavice historia priskribo, ĉar la kronologio estas nekompleta, kvankam ĝi estas pli detala ol la sinoptikaj. Nek ĝi asertas ke la rakontoj kovras ĉiujn marŝojn de Jesuo. La vera celo de tiu ĉi evangelio estas morala. Temas pri veraj okazaĵoj, sed nur en tiu grado ke ili rilatu al ia spirita konflikto.

Tio ne signifas ke la Evangelio de Johano havas neniun historian signifon, aŭ ke ĝi devus esti interpretita alegorie. Male, la libro estas konsiderata kiel ero de la historio, por ke ĝi estu uzata ne kiel kroniko sed kiel historia apologetiko, defendo de la kristana kredo. Ĝi estas popularigita reprezento de spirita vero por la aŭskultantaro, kiu jam estis, aŭ riskis esti, influita de tiatempaj filozofiaj influoj.

Laŭ tradicia kredo, subtenita de la plej malnovaj eksteraj pruvoj, la Evangelio de Johano estis skribata en Efeso, en nuntempa Turkio, por eklezioj en la Romia provinco Asia. Aliaj teorioj estis prezentitaj: oni metis ĝian estiĝon al Aleksandrio, al Palestino aŭ eble al Antioĥio en Sirio. Neniu el tiuj montriĝis esti sufiĉe valida. Sed la plejparto de ĉi tiuj teorioj tamen konsentas ke la evangelio estis skribata por kontraŭbatali la paŝojn de paganaj filozofioj, kiuj emis iri en du kontraŭaj direktoj, materiismo kaj mistikismo.

En kontrasto kun tiuj tendencoj, tiu persono, kiun Johano priskribas, estas nek malsukcesa kaj miskomprenata profeto nek dia revelacio, nek idolo sen homa substanco. Li estas la Vorto kiu fariĝis karno (1,14), kaj tia Li estas vera homo kaj vera Dio. Lia alveno enkondukis novan elementon en la vivon de la homaro kaj faris ĉiujn pensimagojn neadekvataj. Postulas nenion malpli ol ekkonatiĝi kun Li persone kaj kliniĝi antaŭ Lia pretendo. La profunda vero en tiu nova revelacio estas farita en lingvo tiel simpla ke infano povas kompreni ĝin; sed kun signifo tiel riĉa, ke erudiciuloj ne povas elĉerpi ĝin.

La eksplicita celo de la evangelio estas krei kredon. Kredo estas esenca elemento en la progreso de ĉiu homa vivo, kaj iagrade ĝi estas kondiĉo por ĉiurilata ekzisto. Johano parolas multe pri tiu principo kaj emfazas forte, ke aktiva kaj asertiva kredo en Kristo estas la gvida forto de ĉiu spirita vivo.

Plie, la evangelio klare priskribas la signifon de la kredo kaj ĝia efiko. Se kredo rezultigas vivon, la kredanto, kiu atentis pri la estonteco, havas la rajton ekkoni kion tiu vivo signifas. Ĝi estas potenco, ĝi kreskas, ĝi pligrandiĝas, ĝi sin malkaŝas en la konflikto kun la malamikaj fortoj en sia ĉirkaŭo. Pli grava estas la konflikto en la Evangelio de Johano ol ĝiaj okazaĵoj, ĉar en la intrigo, kiel ĝi elvolviĝas en la persono de Jesuo, evidentiĝas la vera enhavo en la libro.

La intrigo* estas — kiel oni povas observi en ĉiu bona romano — ekzemplo de konflikto inter du kontraŭaj fortoj, en kiu unu forto triumfas super la alia. La intrigo de la Evangelio de Johano malkovras la konstantan lukton inter bono kaj malbono, inter kredo kaj nekredado, kiu turnas sin kontraŭ la persono de Jesuo. Tra ĉiuj sekcioj de tiu ĉi evangelio videblas la evoluo de kredo je Kristo, komencante kun la plej malalta kaj plej simpla formo de kredo, daŭrigante al sublima kaj racia adorado, kontraŭa al nekredado. Tiu nekredado komenciĝas kun svaga sento de malamikeco kaj finiĝas per konscia malakcepto de Lia persono. La kialoj por, kaj la rezultoj de, kaj kredo kaj nekredo estas ilustritaj per la historiaj okazaĵoj. La propraj vortoj de Jesuo

estas uzataj por fari aplikojn dum la progreso de la rakonto.

La konflikton en la intrigo montras la *vortprovizo*. La kontrastaj esprimoj lumo kaj mallumo, amo kaj malamo, vivo kaj morto, karno kaj spirito, sklav-eco kaj libereco, ilustras malsamajn aspektojn kaj stadiojn de la evoluo de tiu konflikto.

La intrigo konstruiĝas per la *roluloj*. Sur preskaŭ ĉiu paĝo de la evangelio aperas kontrastaj tipoj: kelkaj kiuj kredis, iuj kiuj ne kredis. Ne temas pri facilanimaj individuoj, kiuj, aŭ estas troige kredemaj aŭ kiuj tute ne kredas, roloj kreitaj de iu literaturisto por elstarigi iun moralan ideon aŭ por dekoracii fabelon. La evoluo estas evidenta en ambaŭ direktoj, ekzemple Tomaso dubas en la komenco sed ŝanĝiĝas fine al firma kredo; Pilato falas tra kompromiso en difinitan indiferentecon.

La progreso estas reflektita en la *agado*, ĉar la lingvo kaj la roluloj estas nur partoj de la rakonto. Ĉe kelkaj personoj, ekzemple ĉe la samarianino kaj ĉe la viro, kiu naskiĝis blinda, la kreda evoluo estas plene priskribita. En aliaj kazoj, ekzemple la kontaktoj kun la disĉiploj en la unua ĉapitro, aŭ en la kazo de la oficiro en la kvara ĉapitro, tiuj okazaĵoj nur reprezentas unu fazon en tiu evoluo. La priskriboj tamen ĉiam celas kredon.

La agado havas du flankojn, ĉar troviĝas du flankoj en la persono de Kristo: la homa kaj la Dia.

Kiel priskribo pri la homa lukto, la Evangelio de Johano estas profunda tragedio. Ĉiuj plej malbonaj el la homaj pasioj kaj kondutoj, ĉiuj ekstremaj

homaj suferadoj kaj malsukcesoj, estas montritaj en siaj nudaj realaĵoj. Ĵaluzo, avideco, hipokriteco, voluptemo, mensogo, perfido, maldankemo, stulteco, brutaleco, rankoro kaj ĉiu alia malbona motivo estas ekzempligita kaj ilustrita en la intrigo en ĉi tiu dramo. Sed samtempe malegoismo, malavareco, boneco, pureco, honesteco, sincereco, sinofero ankaŭ troviĝas tie. Sen dia interveno — kiel en ĉiu granda tragika literaturo — la malbono triumfas, kaj la rakonto ricevas en la krucumo sian malgajan kaj tristan finon.

Kaj eĉ pli: la tragedio estas ironia. Ju pli la homaro luktas kontraŭ la malbono, des pli profunde ĝi estas implikiĝinta. Ekzemple Petro solene promesis, ke li neniam forlasos sian Sinjoron; li pretis doni sian vivon por Li (13,37). Ĝuste la malo okazis. En la propra vivo de Jesuo videblas ironio. Kvankam Li vivis honorindan vivon – Li devis suferi ĉiajn maljustaĵojn kaj insultojn. Majesta – Li mortis en malhonoro kaj humiligo. Ĉiopova – Li ellasis sian spiriton en malforteco. Tiu fakto estas aparte videbla en kaj tra Liaj asertoj, kontraste al Lia fino. Li asertis ke Li estas la akvo de la vivo – li mortis soifa. Li asertis ke Li estas lumo de la mondo – Li mortis en mallumo. Li asertis ke li estas la bona paŝtisto – li mortis en la makzeloj de la lupoj. Li asertis ke Li estas la vero – li estis krucumita kiel trompanto. Li diris ke Li estas la releviĝo kaj la vivo – Li mortis pli rapide ol kutime aliaj krucumitaj viktimoj mortas, eĉ Pilato miris.

Strange, la apogeo de Lia vivo ŝajnis kontraŭdiri la celitan signifon. Se tiu, la plej granda ekzemplo de justeco, kiun

la mondo iam vidis, fariĝis senhelpa viktimo de malbono, tiam la ĉefa temo de la Evangelio de Johano estas la plej profunda tragedio.

El Dia vidpunkto la kvara Evangelio tamen ne estas tragedio sed Triumfo. La okazaĵo rivelas la venkon de la vivo super la morto, de la amo super malamo, de la lumo super mallumo, de la spirito super la karno. La vera kulmino ne estas la krucumo sed la resurekto. La nekredado faras sian plejblan ĉe la kruco sed haltas tie. La kredo restas ĉe la reviviĝo kaj venkas.

La Dia Vorto ne triumfis per sia apero, kiel mistika vizio netuŝebla de la mizeraj malpuraj realaĵoj de la homa vivo, sed spertis la plej malbonan, kiun la vivo povis prezenti kaj poste ĝi nedifektite leviĝis super tion. Tiu ĉi vizio ne estas nur brila revo en kiu homoj trompas sin mem, kredante ke ili triumfos super la mondo, kvankam ne. La alvoko al kredo kreas novan praktikan realaĵon en la ĉiutaga vivo.

En tiu ĉi evangelio Johano metas la bazon por ke ni estu konviktaj “... *sed ĉi tiuj estas skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Kristo, la Filo de Dio, kaj ke kredante, vi havu vivon en lia nomo*” (Joh 20,31).



*) la teksto estas bazita sur la traduko de la angla al la sveda lingvo. La tradukisto uzas la svedan vorton *intrig* [intrigo] por la angla vorto *plot*. Pro tio la jena traduko uzas la vorton *intrigo*.

La Esperanto-Biblio 40-jara

En tri partoj – enkonduko

Karl-Olof SANDGREN, SE

En tri numeroj de Dia Regno en 1966 Karl-Olof Sandgren skribis tri-partan serion pri la Biblio. Pro la ĉi-jara temo de nia kongreso, kiu rilatas al nia legado kaj kompreno pri tio, kion ni legas en la Biblio, tiu eta serio estas interesa ankaŭ por ni. /Redaktoro

Ofte ni legas en la gazetoj pri la apero de la Biblio en la lingvo de iu egzotika tribo aŭ pri modernigita versio en iu el la grandaj naciaj lingvoj, kaj tiam kun fiero kaj profunda dankemo ni pensas pri nia propra, la Esperanta Biblio.

Ni rajtas fieri. Ne ĉiuj eĉ naciaj lingvoj posedas la kompletan Biblion. Vere, el la tri ĝis kvar mil lingvoj sur la tero nur 237 posedas ĝin, kaj el ili multaj ricevis ĝin nur en la lastaj jaroj. (kresko de 30 post 1957!). Ni – kontraŭe – posedas nian Biblion jam dum 40 jaroj (La Novan Testamenton dum 54 jaroj), kaj sekve ni povas ĉijare celebri signifan jubileon pri kiu ĉi tiu kroniko volas memori.

Kiam ni kiel Kristanaj Esperantistoj, kiel Navigantoj aŭ letermisiantoj legas en nia Biblio, ni prave pensas unuavice pri ĝia viva realo, la enhavo, la Evangelia mesaĝo. Sed ĝi havas ankaŭ alian realon. La somera numero de Dia Regno (1957) tuŝis ĝin, menciante ke nia estrarano profesoro Downes korektis novan Biblian eldonon. Tiu realo estas la klopodoj, la multaj horoj de la sindonaj gesamideanoj kiuj zorgis, ke ankaŭ nia

lingvo havu la kompletan Biblion.

Nia Biblio havas sian propran historion, kaj fakte ĝi datas sin al la apero mem de nia lingvo. Dr-o Zanenhof iam skribis:

”Mi opinias, ke estas plej necese, ke ni kiel eble plej baldaŭ posedu bonan tradukon de la tuta Biblio. Kian ajn vidpunkton ĉiu el ni aparte havas pri aferoj religiaj, neniu (eĉ plej granda malamiko de ĉia religio) povas nei, ke el la tuta ĝisnuna literaturo de la homaro la plej grava verko sendube estas la Biblio kaj posedi ĝin en bona Esperanta traduko estus por nia afero eksterordinare grave.”

La unuaj Bibliaj tekstoj

Tiun firman konvinkon Zamenhof havis jam ĉe la publikigo de la lingvo. La unuaj tekstoj, en Esperanto presitaj, estas ĝuste la preĝo Patro Nia kaj la komencaj dek alineoj de la Biblio, kiuj enkondukis la ekzemplan parton de la Rusa lernolibro en 1887. Vi, amanto de Esperanto, memoru tiun detalon ke ĝia unua vivosigno estis sanktaj vortoj!

Ni legu tiun unuan version de Patro Nia el kies ĝermo poste nia tuta Biblio

kreskis. En sia senafekta beleco ĉi tiu teksto majeste parolas pri la granda genio, jes Dia inspiro de Zamenhof.

“Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu Via nomo, venu reĝeco Via, estu volo Via, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj; ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malvera, ĉar Via estas la regado, la forto kaj la gloro eterne. Amen.”

La intereso por la Biblio signis la tutan vivon de Zamenhof sed tiu intereso signis la vivon ankaŭ de multaj aliaj gesamideanoj, kiuj en unu aŭ alia maniero kontribuis. Jam en 1893 aperis la unua Biblia parto, nome La libro Rut, en traduko ne de Zamenhof sed de Germana Esperantisto E. Neumark.

Zamenhof mem komencis sian laboron nur, kiam la lingvo estis matura, kiam la praktika uzo de multaj diversnaciaj gesamideanoj ne nur skribe sed ankaŭ parole montris firme, ke lia kreaĵo estas la vera lingvo kiun li celis, kaj kiam ĝia taŭgeco ankaŭ por plej subtilaj pensesperoj estis neskueble pruvita per beletraj verkoj de ĉiaj specoj.

Zamenhof eklaboras

Kiel nature por kredanta Judo kaj scianto de la originala lingvo, Zamenhof elektis por si la laboron pri La Malnova Testamento. Tiu parto ja ankaŭ estas la pli grava el literatura vidpunkto, kaj kiu alia ol li ja tiam povis redoni ĉiujn belajn nuancojn kaj interpreti korekte la Judajn pensojn kaj scenojn. La Novan Testamenton li humile lasis al aliaj. Kiel

nekristano li ne volis eventuale mal-sanktigi ĝin per sia mano.

En la antaŭparolo al La Psalmaro Zamenhof skribis i.a.:

“Jam antaŭ longe mi intencis kaj promesis traduki la Psalmaron; sub la influo de la deziroj, kiujn mi aŭdis kelkajn fojojn dum la Kembriĝa kongreso, mi decidis komenci la tradukadon. La personoj religiaj volu pardonu min, ke mi — ne pastro kaj ne specialisto en aferoj religiaj — entreprenis fari la tradukon de verko religia; sed mi povas min senkulpiĝi per tio, ke mi tradukis la Psalmaron ne kiel verkon religian, sed kiel gravegan verkon de la homara literaturo. Por celoj pure religiaj eble pli aŭ malpli frue aperos alia traduko, farita de ekleziuloj-specialistoj.”

Tiutempe la Franca eldonejo Hachette havis la monopolon pri Zamenhofaj tradukoj, kaj en ĝia gazeto La Revuo komencis aperadi sinsekve kelkaj Malnovtestamentaj libroj ek de marto 1907. Baldaŭ poste la eldonejo ankaŭ presigis ilin aparte. La unua kompleta libro, La Predikanto, tiamaniere aperis en 1907.

La Psalmaro komencis aperi en La Revuo en decembro 1907. Ĝi plue aperadis parton post parto ĝis marto 1908, kiam la serio finiĝis per la traduko de Psalmo 63. La tuta Psalmaro en libra formo baldaŭ aperis, oni supozas en aŭgusto de tiu jaro. Poste aperis Sentencoj en 1909, Genezo 1911, Eliro kaj Levidoj 1912, Nombroj kaj Readmono 1914.

Tiam eksplodis la unua mondmilito, kaj tiu eldonado ĉesis. Eldonejo Hachette krome seninteresiĝis pri Esperanto!

Tradukoj de Skota presisto

Ŝajnas certe, ke pri kvar el la restantaj libroj Zamenhof ricevis helpon pere de tradukoj faritaj de presisto J. H. Fred el Edinburgh, kiu estis tre kompetenta kaj kiel Esperantisto kaj kiel Hebreisto, kaj kies sinteno al la Biblio estis tute simila al tiu de Zamenhof.

La unua traduko de Fred estis La Kantoj de Salomono, recenzita en aprilo 1913. En la antaŭparolo li skribis:

“Malgraŭ tio, ke D-ro Zamenhof jam de longe laboras sur la Biblia kampo, tamen, pro la necese malrapida progreso de la Zamenhofaj tradukoj, kaj la preskaŭ superhoma tasko de la Doktoro, multe da akvo ankoraŭ preterfluos en la riveroj, antaŭ ol la tuta Biblio estos de li tradukita; tial, mi kuraĝe zonis miajn lumbojn, kaj tendare stariĝis sur unu angulon de la Biblia kampo, malproksime de la Zamenhofa lando; sciante, ke almenaŭ dum multo da jaroj la Doktoro ankoraŭ ne alproksimiĝos al la limbordoj de la parcelo de mi akirita; kaj eĉ tiam, la Doktoro povos traduki la

samajn librojn laŭ sia propra stilo kaj maniero; ,Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj’ diras la proverbo, kaj en Esperantujo nenio estas devigo kaj neniu estas devigata.”

Aliaj tradukoj de J. H. Fred estis Rut, La Plendadoj de Jeremija kaj Ijob, ĉiuj sen datoj. Devas esti, ke tiuj tradukoj estis granda helpo al Zamenhof, aparte tiu de Ijob, ĉar en tiu libro troviĝas granda nombro da vortoj, kiuj ne aperas en la aliaj.

Paralele okazis klopodoj pri La Nova Testamento. Pro konfesiaj diversecoj kaj parte ankaŭ naciaj ŝovinismoj tiu laboro unue ŝajnis malpli facile organizebla. Jam en 1906 aperis en Germanujo La Evangelio Sankta Mateo kun la elokventa subrubriko Laŭ Martin Luther, kaj en 1910 aperis ĉe Scripture Gift Mission (Londono) La Evangelio laŭ Sankta Johano en traduko de Usonanoj Gristead, Lowell kaj Anderson. (Observu, ke tiuj versioj nun ne estas la uzataj!)

(daŭrigota)



Diverslandaj KELI-anoj omaĝas la Esperantobibliotek dum la 30-a UK en Londono 1938.

De maldekstre: f-ino Eva Eriksson, SE (poste s-ino Langkilde -Rasmussen, DK); f-ino Anna Henriksson, SE (poste s-ino Alamo-Sandgren); hungara skolto; f-ino Margareta Jonsson, SE; ĉeĥo aŭ hungaro; brita dungito ĉe la

La graveco de la Sankta Biblio

Honoré SEBUHORO, Ugando

La beleco de la Biblio kreskas kiel ni kreskas en nia kompreno. Nenio povas anstataŭi la Biblion, bazon de ĉiu kulturo kaj de ĉiu edukado. En ĝi estas mia kredo, la Biblio, kiu estis mia gvidanto en mia vivo.

La Biblio estas la plej bona libro kiun la mondo sciis aŭ iam scios. La majesto de la Skriboj blindigis min, la sankteco de la Evangelioj parolas al mia koro kaj la okulfrapaj trajtoj de vereco kaj, krome, perfekte neimitebla. Se ĝi estus la invento de homoj, inventistoj estus pli grandaj ol la plej grandaj herooj. Kaj en mia maljuneco; ekzistas nur unu libro kiun mi povas ankoraŭ relegi, estas la Biblio ... Ĝi neniam forlasas min.

La Biblio estas unu el la plej mirindaj libroj en la mondo: ĉiufoje kiam oni malfermas ĝin, tiu bone konata pasaĝo kiun mi legis dudekon da fojoj brilas subite en nova brilo. La Biblio akcelis la kapojn kaj la korojn de homoj, ekstremis montetojn. Jen estas la libro de la ekzaltoj, grandiozaj bildoj tragikaj, grandaj sociaj postuloj, profetaĵoj anoncanta la fratan egalecon de homoj, kaŭzante la malaperon de milito inter popoloj, la pacigon de la koleraj popoloj kaj de la naturo mem, la repaciĝon de la leono kaj ŝafido paŝtataj en la sama paŝtejo, la malarmadon de kvietigantaj lupoj ... Kaj en la fino de mia vivo: mi legas la Biblion malrapide kaj mi per-

mesas al mi sorbiĝi kun ĝia mesaĝo de paco.

Sola linio en la Biblio konsolis min pli ol iuj aliaj libroj, kiujn mi legis. La Biblio, metita je la dispo de ĉiuj, estas la plej granda gajno, kiu eble iam estis por la homa raso. Ajna atako kontraŭ ĝi estas krimo kontraŭ homaro. La Sankta Skribo havas tiun misteron pri kiu ĝi parolas. Ĝi estas libro kiu enhavas la tutan homan saĝon, lumigitan per ĉiu Dia saĝeco. Semu la vilaĝojn per la Evangelioj, Biblio por la kabanjoj.

James Irwin; Amerika astronauto, unu el 12 viroj kiuj marŝis sur la luno. La plej granda afero en la historio de la homaro, ne estas viro kiu marŝis sur la luno, sed estas Dio kiu marŝis sur la tero en la persono de Jesuo Kristo.

La Biblio estas la plej bona donaco



de Dio donita al la homoj. Sen ĝi ni ne povus distingi la bonon de la malbono. Legu tiun libron akceptante tiom, kiom vi povas kun via racio kaj prenu la reston kun fido kaj vi vivos kaj mortos kiel pli bona vir/in/o.

Eldonis sinjoro Honoré SEBUHORO
Eglise CEBCE REMERA.
PO BOX 08 BUNAGA NA-KISORO
UGANDO
Rete: honsebn@gmail.com;
verdaamikaro@gmail.com

03



Sidi sur pingloj ĉe Walter Kampfrad

Germanio 1901 – 1921 – 1980

Ed BORSBOOM, NL

Komence de la 70-aj jaroj mi estis verkanta biografion pri Lanti, la kreinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Kontrolo de pluraj faktoj necesis. Sekve en 1971 mi vagonare vojaĝis al Leipzig, en la tiam memstara komunisma Orient-Germanio. En tiu urbo vivis ankoraŭ homoj, kiuj ĝis 1933 en SAT ludis rolon. Tiujare la nazioj akaparis la potencon kaj baldaŭ malpermesis la organizaĵon kaj subpremis Esperanton.

Speciale interesis min tie Walter Kampfrad. Li iniciatis en 1930 la fondon de la Esperanta eldonejo Ekrelo. Kiel komunisto kaj granda defendanto de Sovetio li ĉefe aperigis tekstojn el tiu ŝtato pri socialismo. Krome ankaŭ valorajn librojn rilate la kulturon de Esperanto, inter ili “Historio de la mondo-lingvo” de E. Drezen, “Esperanto-Zirkel” de S. Rublov, “Metropoliteno” de V. Varankin. En 1933 la eldonisto estis enkarcerigita de la

nazioj, poste devige metita en la armeon kaj liberigita en 1945. Pri la lingvo de Zamenhof li tute ne plu okupis sin. Li kabeis.

Leipzig troviĝis post la militfino en la parto de Germanio sub sovetia regado. En tiu por Kampfrad oportuna zono li povis studi juron kaj avancis post la fondiĝo de Orient-Germanio al prokuroro. Malfacila persono por intervjui, ĉar mi rigardis kun profunda skeptiko al la nova komunisma lando kaj ĝiaj defendantoj.

Kiel aranĝi nian renkonton? Plej efike ŝajnis al mi, rekte iri al lia domo kaj peti interparolon. Sed kie li loĝas? Pro lia verdiktada laboro, lia hejmadreso certe ne estis konata. En la Esperanto-klubo de Leipzig, kiun mi vizitis, aktivis Hieronymus Stroinski. Li konis maljunan samideanon, kiu en sia arĥivo kolektis la adresojn de ĉiuj intaj kaj antaj Esperantistoj de la urbo. Tiu helpis min. Per la ricevita “strato

kaj numero” mi trovis la apartamentaron, en kiu loĝis la intervjuoto. Iel prosperis al mi enŝteliĝi. En la unua etaĝo sur iom longa koridoro dekstre kun fenestroj kaj maldekstre kun 8-10 pordoj. Bela atingo, sed la pordoj ne havis numerojn kaj nom-ŝildojn. Mi hezitis, kion fari?

Neatendite eniris ĉe la fino de la koridoro viro, kiu kelkajn metrojn antaŭ mi haltis. Li malafable demandis: “*Kion vi serĉas ĉi tie?*”, “*Mi serĉas sinjoron Kampfrad.*” “*Estas mi, kion vi volas?*” li lakone respondis. En tiu sekundo mi ŝanĝis la lingvon al Esperanto. “*Mi venas el Nederlando kaj verkas libron pri Lanti kaj SAT.*” *Espereble vi povas doni informojn.*” Ankaŭ li ŝaltis al Esperanto, sed lia malafablo restis dum li proponis al mi eniri.

En lia sufiĉe komforta loĝejo ni komencis la konversacion. Unue pri ĝeneralajoj rilate Orient-Germanion, sed li tiel minace rigardis, ke mi havis la senton, ke post eventuala ne favora vorto mia pri lia lando, li tuj igus aresti min. Vere malkomforta etoso. Mi kva-zaŭ sidis sur pingloj. Pro lia ligiteco al Sovetio, mi direktis miajn demandojn al la iamaj rusaj Esperantistoj. “*Kial oni ekzekutis Ernest Drezen?*”, “*Drezen ne estis proleto kaj evidenta perfidulo.*” “*Ĉu la mortigo de Nikolaj Nekrasov ankaŭ okazis pro lia perfideco?*”, “*Ne, tio estis eraro!*” Pro la fakto, ke mi planis flugon al Sovetio por plua esplorado, mi bezonis tie la adresojn de kelkaj

antaŭmilitaj SAT-anoj. Kampfrad serĉis libreton, foliumis kaj donis tiujn de Podkaminer en Leningrad*), Demidjuk en Moskvo kaj Cimberov en Jalto.

Post tiu sukceso mi riskis la demandon, kial li ne plu aktivis en la Esperanto-movado. Tiam sekvis vera lekcio pri la netaŭgeco de la lingvo, la nepraktika idealisma enhavo, la aliaj ideoj de la hodiaŭa generacio. Sed subite li ekstaris, iris al la libro-ŝranko, dirante “*Tamen ekzistas ankoraŭ junuloj, kiuj vidas en Esperanto perspektivon. Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis de iu studento en Berlino manuskripton, en kiu li pozitive pritraktas la lingvon.*” “*Kio estas lia nomo?*”, mi reagis. “*Jes momenton.*” Kaj li serĉis la koncernen referaĵon. “*Li nomiĝas Detlev Blanke.*”

Tiel finiĝis nia interparolo. Mi denove staris sur la strato kun informoj sen pinglo-vundetoj.



*) nuna nomo estas Sankt-Peterburg

Leipzig en la jaro 1971.



Kara Redaktoro 1

Unue, mi petas, ke legantoj pardonu tiun ĉi bazan nivelon de Esperanto, kiun mi uzas. Mi ankoraŭ estas komencanto-esperantisto.

Mi tre estimas la artikolon de Vilĉjo Goldsmith, “La morto de patrino”, en Dia Regno numero 1 de 2016.

La situacio de Vilĉjo, pri la morto de la patrino, estas tre simila al mia situacio. Mia patrino mortis dolore de kancero kiam mi havis dek jarojn. Ŝi mortis merkrede la 5:an de Februaro 1971 inter 10:25 kaj 10:30 ptm. Mi tre bone memoras la ĝustan momenton, kiam ŝi forlasis min. Mi neniam forgesas tiun tagon, tiun horon, tiun okazaĵon. Mia mondo ĉesis tiam.

Sekvan matenon, mi akompanis la patron al la funebra direktoro dum mi estis ankoraŭ en ŝoko. Poste, reveninte hejmen, mi demandas al Dio, “Kial?” Li ne respondis ĝis kelke da tempo poste. Li donis la respondon tiamaniere: Per la suferado kaj morto de mia

patrino, mi kuraĝiĝis pripensi fariĝi kuracisto. Kaj tion mi faris. Kaj pro tio, mi helpis multe da personoj, inkluzive tiujn personojn, kiuj suferis de kancero kiel mia patrino.

Mi konas Jesuon ekde mi havis ok jarojn. Je la aĝo de dek, mia fido kreskis, ĝi ne malfortiĝis. Dio havis planon por mi.

Do, dankon, Vilĉjo, pro via historio. Per ĝi, mi memoriĝis pri Lia plano por mi.

Ĉar Mi scias la intencojn, kiujn Mi havas koncerne vin, diras la Eternulo, intencojn al bono kaj ne al malbono, por doni al vi estontecon kaj esperon (Jeremia 29:11).

Mark Sterrick
2 Balmuir Avenue,
Bathgate, Skotlando.
marksterrick@outlook.com

Kara Redaktoro 2

Tre interesas min la reago de Eva Farkas-Tatar al mia artikolo “Oni Preĝas, la Pluvoj Venas.” Eva skribas ke tiu artikolo “tute indignigis min,” kaj “Mi trovas tre malinda tiel fari reklamon por Dio ke: vidu la tuta regiono suferas pro la sekeco, sed super la terpeco de la kristanino Dio donas pluvon!”

Mi nur raportis la faktojn kiel ili okazis. Mia onklino havis grandan bezonon de pluvo. Ŝi preĝis kaj Dio

sendis pluvon sur ŝiajn kampojn kaj sur la aliajn kampojn DEK kilometroj ĉirkaŭe. Do, mi havas kelkajn demandojn. Ĉu la indigno estas pro la malkonvena preĝo de mia onklino? Ĉu la indigno estas pro la malkonvena respondo de Dio al la malkonvena preĝo de mia onklino? Aŭ, ĉu la indigno estas pro mia raporto pri la malkonvena respondo de Dio al la malkonvena preĝo de mia onklino?!

Vilĉjo Goldsmith

Dukapa monstro naskiĝis en Hindujo

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

En Sukro-path, fora triba vilaĝo de la ŝtato Madhya Pradesh, Hindujo, la 1-an de septembro de 1999, nokte, 25 jara virino, Sukhwari Bai, naskis infaninon. Nanhi, Dashri, kaj Sumatra helpis ŝin kiel akuŝistinoj. Tio ne estis feliĉa evento. Ĝi vere estis tragedio.

La infanino havis du kapojn. Sed ŝi ne estis ordinara du kapa ĝemelo; la dua kapo kreskis el la supro de la unua! Ankaŭ, estis unu sola reala okulo. En la tri aliaj lokoj kie devus esti okuloj, estis nur buloj de karno. Sukhwari, ŝia edzo, Dashru, kaj la tri akuŝistinoj estis tre, tre hororigitaj. Ili pensis meti la monstron en ceramikpoto kaj ĵeti ĝin al ĝangalo kiel manĝaĵo por la bestoj.

Sed finfine ili decidis: “Ni nun estas kristanoj, kaj tial ni ne devas fari tion. Ni devas preĝi por la infanino.” Je tiu tempo estis nur 15 aŭ 16 kristanoj en Sukro-path. Kvar viroj — Dashru, la patro, Adru, Shadru, kaj Labhu — kunvenis kun la virinoj por preĝi. La eta grupo fervore preĝadis dum la tuta nokto. Jesuo aŭskultis ilin kaj la kapo(j) de la infanino komencis ŝanĝiĝi. Je la mateno, ŝi estis bela infanino, tute normala, kun unu kapo kaj du sanaj okuloj!

La saman matenon, alvenis al la domo du evangelistoj, Kalam kaj Sybet.

Ili preĝis kun la gepatroj kaj ili nomis la infaninon 'Ester'. (La Judaj Skriboj rakontas la historion pri la belega reĝino Ester kiu kuraĝe savis sian Judan popolon el ekstermado.)

La informo pri ĉi tiu miraklo troviĝas en la libro “Mega Shift” ['Mega Ŝanĝiĝo'], de James Rutz, paĝoj 108 kaj 109. Kiam S-ro Rutz eksciis pri la miraklo, li sendis teamon por zorge esplori la aferon. La anoj el la teamo vojaĝis 400 kilometrojn tra danĝera ĝangalo, danĝera ĉar tie estas sovaĝaj tribanoj kaj gerilanoj. La 14-an de septembro de 2000, la teamo plenumis sian komision, reveninte kun ampleksa raporto kaj fotoj. La fotoj aperas inter la paĝoj 136 kaj 137. Kiam la teamo faris la fotojn, Ester havis pli ol unu jaron kaj ŝi estas belaspekta, normala knabino.

Dum Jesuo Kristo piediris sur la tero antaŭ 2000 jaroj, Li resanigis blindulojn, lamulojn, leprulojn, surdulojn, kaj eĉ revivigis mortintojn. (Sankta Mateo 11, 5). Jesuo ankoraŭ vivas kaj Li ankoraŭ havas potencon por fari miraklojn.

Glorata estu Lia Nomo!



Donald BROADRIBB

En la antikva mondo, kiel en la moderna, provizado de akvo al urboj estis malfacila problemo. Unu el la plej gravaj inventaĵoj de la homa historio, efektive, estis la prepariĝo de cemento kiun akvo ne povas penetri, ĉ. 1300 aŭ 1400 jarojn antaŭ Kristo. Per ĉi tiu trovaĵo, oni povis fari cisternojn kaj tiel konservi akvon, anstataŭ dependi de rivero aŭ permanenta fonto. Vilaĝo kaj urboj ĝis tiam estis nur tre malmultaj en la mondo, ĉar ili devis lokiĝi apud konstantaj akvofontoj. Nun oni povis konstrui vilaĝojn ie ajn, nur kondiĉe ke pluvas sufiĉe por plenigi la cisternojn. En la antikva mondo tio kaŭzis veran socian revolucion.

Sed grandaj “urboj” situis, kiel ĉiam, apud pli fideblaj akvoprovizejoj. Kiam ni pensas pri “urbo”, ni devas, tamen, ne supozi urbon laŭ la moderna senco. Kvar aŭ kvin mil personoj, maksimume, loĝis en “granda urbo” plejofte, kaj multaj “urboj” estis multe pli malgrandaj.

Jerusalem estis grava urbo jam longe antaŭ la epoko de Izraelo. Ekzemple, ni legas en Gen. 14 pri Melkicedek, la reĝo de Salem, kiu renkontis Abrahamon. Melkicedek estis ne nur reĝo, sed ankaŭ ĉefpastro de sia urbo. Salem estis la nomo de Jerusalem en tiu frua epoko. Multajn jarcentojn poste, David konkeris Jerusalemon kaj faris ĝin posedaĵo de la reĝo, reĝa teritorio, kaj tia ĝi restis

ĝis la ekzilo. Jerusalem dependis, por sia akvo, de unu sola fonto, Giĥon. La fonto estis ĉe Ŝiloaĥ, vilaĝo tuj ekster la iamaj urbomuroj de Jerusalem. La strategia valoro de la fonto estas tuj evidenta: ĉar la fonto estis ekster la urbomuroj, armeo povus detruigi aŭ iel kapti la fonton, kaj la urbo estus tute sen akvo. Post nur kelkaj tagoj, la urbo devus cedi. Dum la monarkio juda estis forta, kaj la judaj armeoj povis protekti Jerusalemon, tio ne multe gravis, kvankam ofte oni efektive trovis malamikajn armeojn apud Jerusalem. Sed en 721 a.K. la asiria armeo konkeris Izraelon (la nordan nacion), kaj atakis Judujon. Reĝo Ĥizkija de Judujo ektimis pri la akvoprovizoj por Jerusalem, ĉar la asiria armeo estis tre potenca, kaj sieĝis Sama-



rion dum tri jaroj. Evidente, se okazus egale longa sieĝo kontraŭ Jerusalem, Jerusalem devus kapitulaci longe antaŭ ol forpasus tri jaroj. Ni do legas en 1 Reĝo 20,20 tre simplan deklaron: “Ii faris la lageton kaj la akvotubon kaj enkondukis la akvon en la urbon.” En 2 Kroniko 32,3-4 ni legas iom pri la afero: “Ii konsiliĝis kun siaj eminentuloj kaj fortuloj, kaj decidis ŝutkovri la akvon de la fontoj, kiuj estis ekster la urbo; kaj ili helpis al li. Kaj kolektiĝis multe da popolo, kaj ili ŝutkovris ĉiujn fontojn...” La “fontoj” evidente estas la elfluejoj de la unusola fonto, Giĥon. Krome, Ĥizkija rekonstruis kaj fortikigis la murojn de la urbo, anticipante longan sieĝon. Efektive, la asiria armeo komencis sieĝi la urbon, sed la sieĝo fiaskis.

En 1838 esploranto trovis akvotunelon apud Jerusalem, kaj en 1880 oni trovis dediĉon ĉizitan en la muro en la mezo de la tunelo. La teksto estas nekompleta: oni preparis relative grandan surfacon sur la muro por la teksto, sed uzis nur parton de la surfaco. Ŝajnas ke oni intencis daŭrigi la tekston, aŭ eble enĉizi simbolan desegnaĵon ian, sed oni


devis ĉesigi sian taskon nur parte farinte ĝin. Oni sugestis ke eble la asiria armeo ekvidiĝis je tiu momento, kaj oni devis tuj kuri en la urbon, sed tio estas nur konjekto. Jen kion diras la teksto

la borado, kaj ĉi tiel konstruiĝis la tunelo: kiam la pikiloj direktiĝis unu al la alia, kaj ankoraŭ necesis bori 1½ metrojn, oni ekaŭdis la voĉojn, unu de la alia, ĉar estis fendo (? aŭ: on precize laboris) de dekstre kaj kiam kompletigis la tunelo, la minantoj frapis siajn pikilojn, unu per la alia, kaj la akvo komencis flui de la fonto al la rezervejo, 530 metrojn. 60 metroj da roko estis super la kapoj de la minantoj.


Kiel oni vidas, la teksto estas iom difekta. Ŝajnas ke iom da teksto mankas en la komenco. Oni povus sugesti: “*Pri la borado, jen kiel la tunelo konstruiĝis....*”

La bildo ŝajne estas tia: la minantoj bone mezuris, kaj sukcesis renkonti unu la alian en la mezo. Efektive, malgraŭ la teksto, la tunelo tute ne estas rekta, kaj la renkontiĝo de la minantoj (kelkaj komencis de unu fino kaj la aliaj de la alia fino) estis pli hazarda ol planita.

☪



La teksto
1) en la tunelo
2) kopio



Ne forgesu ĝoji!

Julia SIGMOND, IT/RO

Ĉiuj homoj pli ŝatas ĝoji ol malĝoji. Aŭ estas esceptoj, ĉu?

Certe, la pli aĝuloj aŭ la pli konscienculoj ĝojas pli malfacile ol la infanoj.

Tamen. Oni devas trovi ĉiutage iun ĝojon, ke la vivo estu pli bela kaj pli eltenebla, precipe por la olduloj.

Multaj maljunaj homoj diras: mi jam ne povas ĝoji! Mi ne plu havas kialon por ĝoji. Pro kio mi ĝoju? Mi estas maljuna, mi estas malsana, mi estas sola. Forte mi sentas, ke mi jam al neniu utilas. Mi havas la certecon, ke tute vane mi vivas. Miaj gefiloj kaj genepoj vivas sian propran vivon. Post mia morto, ili sentos malŝarĝiĝon, ke ili ne plu devos zorgi pri mi. Post mallonga tempo ili forgesos min. Eble mi ne edukis ilin sufiĉe bone! Sed mi ne rajtas postuli de ili dankemon! Ja ankaŭ mi neglektis miajn praulojn. Neniam mi vizitis ekzemple miajn tre maljunajn geavojn, nur unufoje po jare, ĉe la kristnaskfestoj, kiam ili donis al ĉiuj membroj de la familio donacojn. Nek miajn gepatrojn mi vizitis ofte. Ĉiam ili predikis al mi, ke mi vivas erare mian vivon, kaj laŭ ilia opinio mi devus ŝanĝi ĝin. Kaj nun, kiam mi maljuniĝis, la sama okazas al mi. Do, mi havas neniun kialon por ĝoji.

Tiuj sentoj estas preskaŭ ĝeneralaj ĉe maljunuloj.

Tamen! Estas ankaŭ esceptoj! Mi mem konas maljunulojn, kiuj eĉ oldiĝante kapablas ĝoji en la vivo. Kio estas ilia sekreto?

Simple, ili decidis, ke ĉiutage ili serĉas kialon por ĝoji! Ĉar eblas trovi ĝin! Jen, nur kelkaj proponoj por tiuj, kiuj jam senesperigis.

Matene, vekigante, la unua rigardo al la ĉielo montras, ke ĝi estas blua! Jam tiu blueco povas ĝojigi iun ajn, ja tio aŭguras belan veteron. La blua koloro donas animan gajecon, oni nur devas esti iomete pli atenta, kaj rimarki ĝin!

Sed se la ĉielo estas griza, eĉ tiam eblas senti gajecon, ĉar oni povas pensi pri la belegaj floroj de la ĝardeno. Transprenante de la floroj la ĝojon pro la pluvo, ankaŭ ni povas iĝi gajaj.

Jam multaj homoj alkiutimiĝis al la trinkado de la pura akvo frumatene. Ho! Kia ĝojo, ke ekzistas tiu akvo! Ja sen ĝi ne estas vivo! Multaj homoj trinkas la akvon, kvazaŭ tio estus tute normala ke ĝi ekzistas, eĉ ne pensante, ke estas lokoj sur la terglobo, kie homoj tute ne posedas ĝin. Trinkante akvon, ne forgesu ĝoji!

Ridetu al la unua homo, kiun vi ekvidas, ĉu matene, ĉu dum tage. La homa rideto havas iun tute specialan valoron, kvankam ĝi estas tute senpaga! Kaj se iu ridetas al vi, nepre reridetu!

Sciu, ke vi ambaŭ donas unu al la alia iun valoregan donacon: amon.

Sed se tiel okazas, ke pasas tago, sen renkonti aliulon, kaj se vi havas nek katon, nek hundon, al kiuj same vi povus rideti, prenu spegulon kaj ridetu al vi mem. Vi eĉ povas diri laŭte: mi amas cin! Lernu esti feliĉa! Se vi perdis

la senton de ĝojo, lernu ĝin denove! La tago plej malŝparata en unu jaro estas tiu, dum kiu ni ne sukcesis donaci nek ricevi rideton.

Neniam forgesu ĝoji!

☪

Bibliaj tagoj en Baia Mare

Raporto

Stafan LEPPING, DE

Laŭ komuna decido dum Bibliaj Tagoj 2015 en Vroclavo/Breslaŭ, la Bibliaj Tagoj okazis ĉi-jare en la nord-okcident-rumana urbo Baia Mare, la 6an ĝis la 10an de aprilo.

Maria Laszlo, aktiva vidvino de reformita hungarlingva pastoro, tre bone kaj ĉarme organizis, helpis, ĉiĉeronis – helpate de sia nepino Helga-Vanessa, kiu partoprenis ankaŭ en Vroclavo, kaj pluraj aliaj lokuloj, (esperantistoj, kaj parte tre interesitaj ne-esperantistoj.)

Nin afable kaj varmkore gastigis katolika paroĥa domo kun multe da por ni tre taŭgaj ĉambroj: kapelo, prelegejo, matenmanĝejo. Loĝado estis por plej multaj en hotelo en piedira distanco de 10 minutoj, tie ni ĉiuj ankaŭ manĝis tage kaj vespere.

La tri matenaj “studsesioj” pri la profeto Jesaja estis gvidataj de Patro WILLIBALD, benediktano, kaj de Wolf-ram ROHLOFF, juna luterana pastoro. La libro Jesaja konsistas el diversaj partoj, unue sufiĉe pesimisma parto, ke la

popolo ne konvertiĝos, eĉ per admono de la profeto – eĉ pli obstiniĝos! Efektive sekvas la ekziligo al Babelo, komparata al kompleta forhakiĝo de arbo, tiel ke restas nur la trunko. Por tiuj, kiuj amas sian popolon kaj religion, senespera situacio. Sed tamen, tie en Babelo (kiu estas alta “moderna” kulturo!), post multaj jaroj de foresto de videble ekzistanta juda popolo kaj kulto,



La du prelegantoj

okazas iu “resurekto”: La persa reĝo Ciro (Kyros) supervenkas Babelon kaj ordonas al judoj, reiri al sia lando kaj ties ĉefurbo Jerusalemo, rekonstrui la templon, kaj repreni la kulton al la unu Dio de Israel. Rigardante la anoncojn de pereco, kaj la promesadojn de nova vera kaj daŭra feliĉeco en kazo de sincera reveno al Dio, oni vidas, ke ne temas nur pri la politika situacio en tiuj antikvaj tempoj, sed ke la historio ripetiĝas, en granda skalo kaj ankaŭ en personaj vivoj; krome fariĝas klare, ke la promesoj ne nur temas pri enmonda feliĉeco, sed transpasas la limojn al ĉiamdaŭra eterna savo, por unuopuloj, kaj por la popolo (respektive ties sav- ebla resto).

Gravan rolon, ankaŭ por la Nova Testamento, ludas la t.n. kantikoj pri la Servanto de Dio (Jes. 42, 1-9; 49, 1-9; 50, 4-9; 52, 12-53), kiuj povas esti interpretataj diversmaniere: 1:e kolektive (Israel/la Dipopolo, do en spirita senco ankaŭ la kristanaro), 2:e indid- ue, rilate al la Mesio/ Jesuo Kristo – tiam la simileco kun partoj de la pasiono estas okulfrapa!, kaj 3:e, sed nur laŭ- parte, ankaŭ al tiu kaj alia individua



Post matenmanĝo

persono. Kaj tiuj tri interpretadmanieroj ne estas kontraŭdiraj, sed komplementaj.

Kelkaj partoprenantoj komencis la tagon frue, je la sepa, per rozario kaj sankta meso. Post la komuna matenmanĝo, je la oka en amika kaj gaja rondo, sekvis ekumena matena preĝo kaj kantado (je la naŭa). Ankaŭ la tempojn de prelegado el Jesaja (je la deka) ni jen kaj jen interrompis per trafaj kantoj el la riĉa trezoro de la internacia kaj ekumena kantararo kaj preĝaro ADORU. Je la 13:30 ni iris tagmanĝi, bonguste kaj tamen favorpreze, en la proksima nova hotelo Roxana Imperial.

Posttagmeze ni ekskursis kaj konatigis kun la loka kristana historio: En ĵaŭdo al la historia centro de Baia Mare, kie ni ankaŭ ĉarme paŭzis en stratkafejo sur la vasta urboplaco, aŭdinte kelkajn eksplikojn de Maria Laszlo, kaj aŭdonte tiujn de Gabriela Stier-Fischer. Ankaŭ en la vizitataj preĝejoj, ni “testis la akustikon” per unu/du kantoj el ADORU, kaj per iomete da orgenludado fare de mi ;-)

La duan posttagmezon, ni faris pli longan ekskurson en la belan montan regionon norde de Baia Mare, al restarigita ortodoksa Monahinejo Bârsana.

Sabate, ni havis koran kaj varman akceptiĝon de ortodoksa pastro kaj paroĥo en Baia Mare, kaj ties ĥoranoj eĉ invitis nin poste al kukajoj kun limonado en ilia paroĥa domo.

Post tio, ni kun Wolfram festis luteranan Diservon kun Sankta Manĝo en la kapelo en la t.n. Stefana Turo, en la centro de la urbo. Tio estas la sola restaĵo de la iama paroĥa ĉefpreĝejo de



Baia Mare: pro daŭraj kvereladoj inter la konfesioj, finfine (plej laste en la 19a jarcento) ĉiuj rezignis pri ĝi kaj konstruis siajn proprajn preĝejojn.

La romanik-stila, tre simpla kapelo en la turo estas hodiaŭ ekumena kapelo, sed bedaŭrinde malmulte uzata kaj akceptata. Do ĝia uzo de nia ekumena internacia grupo estis bela kaj simbolhava signo de la espero je ĉeso de kvereloj kaj repaciĝo/reunuiĝo.

Sekvis, reveninte al “nia” paroĥa domo kaj preĝejo, publika koncerteto de tri talentaj gejunuloj kun piana muziko de i.a. Chopin, kaj klarneta triopo de Stamitz.

La vesperaj preĝoj, post tiaj tagoj plenaj kaj riĉaj je travivaĵoj, (cetere ankaŭ kun bona kaj varma vetero), kompreneble malŝvelis al simpla vespera kanto el ADORU, post kiu iuj restis en babilaj rondoj, parte kun bela vino aŭ biero, aliaj sin retiris, kaj iuj eĉ

ankoraŭ eluzis la hotelan diskotekon kun interesa muziko kaj moderna kaj rumana.

En dimanĉo, tiuj kiuj volis ankoraŭ festis lastan sanktan meson. Post komuna matenmanĝo kaj post ekumena danko diservo (laŭ la rubriko “reformita Diservo”, sed sen sankta manĝo), ni fermis la ĉijarajn Bibliajn Tagojn iom antaŭ tagmezo, per la kanto “*Homoj kantu ĝojokanton, dankmotivojn konas vi*” (ADORU 597) laŭ la melodio de la eŭropa himno.

La plej multaj ankoraŭ havis antaŭ si longan vojaĝon, kio ankaŭ estis unu el la kaŭzoj, ke ĉifoje ni estis ne multaj, nur dekduo; el Germanio, Italio, Ĉeĥio/Slovakio, Rumanio kaj kelkaj lokuloj.

Laŭ mi, kaj mi pensas ankaŭ por la aliaj, tio ne malhelpis la riĉecon kaj belecon de la ĉijaraj Bibliaj Tagoj, ni ĝuis la tagojn – pasantaj tro rapide! – en amikeca gaja rondo, malgraŭ negranda kvanto, pro granda kvalito ;-). Sed ni tamen pripensis kiel ni kristanoj ene de la Esperanto-Movado povu pli efike “inter-esti”, ĉar mi certas, ke kaj spiritaj temoj, kaj kantado (ja ne devas esti nur religiaj kantoj), interesas multe pli vastan rondon el niaj “samlingvanoj”. (Mi mem malkovris kaj ekvizitis kristanajn Esperanto-aranĝojn nur post 22 jaroj da Esperantisteco.) La vojaĝado (ofte aldona al somera vojaĝo!) kompreneble kostas monon kaj tempon, kion multaj ofte ne havas kiel ili dezirus.

La unua aliĝinto (italo) insistis aliĝi jam en Baia Mare!

Lignopreĝejoj en Maramureŝo

Teksto el Vikipedio

Fotoj de Olda Fischer kaj Gabriela Stier dum la ekskurso al Bârsana

Dum la Bibliaj tagoj, la grupo faris ekskurson al la Bârsana ligna preĝejo. La jena teksto estas ĉerpita el Vikipedio sub la rubriko “Lignopreĝejoj en Maramureŝo”.

Troviĝas proksimume 60 preĝejoj en la regiono Maramureŝo, el kiuj proksimume 45 troviĝas en Rumanio kaj proksimume 15 en Ukrainio.

Unesko deklaris ok el ili, ĉiu en la distrikto Maramureŝo, al monda heredaĵo. Ili staras en Bârsana (konstruita en 1720), Budeŝti (1643), Deseŝti (1770), Ieud (meze de la 18-a jarcento), Plopiŝ (1796/98), Poienile Izei (1604), Rogoz (1663) kaj en Ŝurdeŝti (1766). Unesko difinis tiujn ĉi ok lignopreĝejoj en 1999 kiel elstaraj ekzemploj por eklezia arĥitekturo tipa por norda Rumanio.

La preĝejoj devenas el malsamaj epokoj kaj do ankaŭ havas stilemen-

tojn malsamajn. Tamen ili kune reprezentas ĉi-regionan tradicion de preĝejonkonstruo. Pro malpermeso konstrui ortodoksajn preĝejoj el ligno en Transilvanio oni starigis la praece aspektajn preĝejoj el ligno, uzante tion de fagoj, kverkoj, abioj kaj ulmoj.

La karakterizaj maldikaj sonorilturoj troviĝas ĉe la okcidenta flanko de la domoj. Ĉiuj ok preĝejoj havas tegmentojn kovritaj per ŝindoj.

La interna ekipaĵo konvenas al la ortodoksa eklezio. Freskoj pentritaj sur ligno montras motivojn el la Malnova Testamento kaj ankaŭ bildigas la vivon de diversaj sanktuloj.

La preĝejo en Cuhea ne disponas pri sonoriloj, sed ĝi vokas la kredantaron al la diservoj per frapado de “horligno”.

☪



La distrikto Maramureŝo en norda Rumanio. ↑

← Lokoj kun lignopreĝejoj (Bârsana en elipso)

Grafiko el Vikipedio kaj farita de Meichs.





Pri la Ortodoksa Monahinejo Bârsana, prelegas la esperantisto de Baia Mare Emil Crâncău.

La papo kunportas 12 siriajn rifuĝantojn al Vatikano

Laŭ informo en svedaj gazetoj, la papo Francisko vizitis, meze de aprilo, rifuĝejon sur la insulo Lesbos en Grekio. Li volis montri sian apogon al la cent-miloj da migrantoj kiuj venis al Eŭropo. En sia parolo al la rifuĝantoj la papo Francisko substrekiis, ke ili ne estas solaj en tiu malfacila situacio, kaj la papo admonis la mondon ke ĝi montru “komunan homecon” dum la rifuĝanta krizo.

La Vatikano informas ke 3 familioj el Sirio akompanis lin reen al Italio.

Dum la vojaĝo, la papo ankaŭ renkontis la orient-ortodoksan patriarkon Bartolomeo la 1:a kaj la grekan ĉefministron Tsipras. Kaj la papo kaj la patriarko esprimis siajn komunajn opiniojn, ke Eŭropo ne faru diferencon inter azilpetantoj kaj ekonomiaj migrantoj.



La papo kaj la patriarko en Jerusalemo.
Foto de Nir Hason, Vikipedio

/red

66a Kristana Kongreso de KELI

Bratislava, Slovakio, 16. – 23. 7. 2016

Temo: Ĉu vi komprenas kion vi legas? Kiel vi legas?

Daŭriga listo de aliĝantoj al 66-a KELI kongreso

33 Mynttinen Synnöve	Finlando	37 Lovasz Lidia	Rumanio
34 Křížková Jana	Ĉeĥio	38 Banáti Katalin	Hungario
35 Kavková Nikola	Ĉeĥio	39 Éva Farkas-Tatár	Hungario
36 Kavková Adéla	Ĉeĥio	40 Éva Farkas	Hungario

Nia alfabeto – Litero A

La unuaj simboloj, kiujn la homaro uzis, por noti okazaĵojn, komunikiĝi aŭ libroteni, estis simplaj imagsimilaj simboloj, t.n. ideogramoj, kiel la egiptaj hieroglifoj. Plej verŝajne ili unue formiĝis 4000-5000 jarojn a. K. Tiuj simboloj laŭopinie estis la bazo, kiu ĉe la fenicianoj fariĝis vera alfabeto.

La fenica alfabeto, kreita kaj uzita en la antikva lando Fenicio ĉirkaŭ 3000 jaroj a.K. estas la praalfabeto, de kiu originas ĉiuj nunaj alfabetoj.

Origine la ideogramoj estis ĉizitaj en ŝtonon aŭ alian malmolan materion kaj pro tio ili estis kvadratformaj aŭ havis rektajn liniojn.

La grekoj, kun siaj kontaktoj kun la fenicianoj, prenis la skribsistemon kaj adaptis ĝin por sia lingvo. Tio okazis ĉirkaŭ 800-500 a.K.

Siavice la romianoj prunteprenis la grekajn literojn kaj adaptis sian latinan alfabeton.

La litero A, la unua litero en nia alfabeto, verŝajne devenas el la fenica vorto *alef*, kiu signifas bovo kun grava signifo por la homaro – manĝaĵo.

La ideogramo montras la bovan kapon kun ĝiaj kornoj kaj jugo.

Ĉirkaŭ 700 jaroj a.K. la grekoj turnis la simbolon kaj ŝanĝis la nomon al *alfa*.

En pluraj paŝoj, ĉirkaŭ 500 jaroj poste, la romianoj aldonis detalojn kaj nomigis ĝin *A*.

De post la naskiĝo de Kristo, la litero havas pli/malpli la saman aspekton. Inter la jaroj 200-600 iom post iom la minuskloj kaj la kursivaj variantoj formiĝis.



















œ

Aa

Times New Roman


Aa

Blackletter686BT

Egyptian	Cretan	Phoenician <i>aleph</i>	Semitic	Greek <i>Alpha</i>	Etruscan A	Roman/Cyrillic A	Boeotian 800-700 BC	Greek Uncial	Latin 300 AD Uncial
				 Aα					
									

Sur azenid' al Jerusalem'

QUAND JÉSUS ENTRE À JÉRUSALEM



1. Sur a - zen - id' al Je - ru - sa - lem'
Mul - ta po - pol' pri - ju - bi - las lin,



raj - das Je - su' — en la pro - ce - si'.
kan - tas ek - zal - te kun o - va - ci'.

refreno:



Jen vi - a Reg', po - pol' de Di! Tu - te hu -



mi - le ve - nas li. Ho - sa - na al la Fil' de



Di! Ho - sa - na! Es - tu glor' al li. Ho -



sa - na, ho - sa - na, ho - sa - na! Ho -



sa - na, ho - sa - na, ho - sa - na!

2. Junaj, maljunaj honoras lin,
sternas vestaĵojn sur lia voj',
sternas kaj svingas laŭ tradici'
branĉojn de palmoj kun granda ĝoj'.

3. «Fil' de Davido, Profet', Mesi'!»
Tiel la aro nun benas lin.
Post kelkaj tagoj kriaĉos ĝi:
«Lin vi krucumu! Krucumu lin!»

QUAND JÉSUS ENTRE À JÉRUSALEM • Alléluia 54.09 • M kaj franca T: © Noël
Colombier • E: Albrecht Kronenberger 2015-07-07 kun afabla permeso